

70 jaroj de Esperantista Klubo en Brno

Brna esperantistaro rememoros en la tagoj 11.-13. de junio nunjara 70-an datrevenon de fondo de la unua esperantista klubo sur teritorio de iama Aŭstrio-Hungario, kiu estis konstituita en junio 1901 sub titolo Aŭstria Esperantista Societo en Brno, en Laborista domo de la nuntempa Marks-strato. Ĝi estas grava jubileo rajtiganta rememori kaj reregardi la faritan laboron por evoluigo de la movado

kaj de tio, kio estis farita por ideo de interkompreniĝo kaj paca kunvivado.

Fondinto de la klubo estis redaktoro Karel Pelant, tipografo Jan Kajš kaj Václav Kovanda, unu el postaj fondintoj de laborista kooperativo Včela. La societo ricevis permeson ekzisti nur post interpelacio de fama deputito Josef Hybeš en la viena parlamento. Tiel estis fondita la klubo kaj elektita la unua komitato, kies prezidanto estis Karel Pelant kaj sekretario Václav Kovanda. Membroj de la klubo entis ĉeĥoj kaj germanoj. La nova klubo tuj vigle eklaboris aranĝante plurajn prelegojn kaj kursojn kiel en la urbo tiel en la antaŭurboj. K. Pelant verkis eminentan broŝuron *Ideo de la internacia lingvo kaj konata brna poligloto Frant. Vymazal verkis lernolibron Esprante facile kaj rapide*. Sed jam antaŭ tio bonega helpilo por la unuaj laborantoj estis kaj restis detala lernolibro, kies aŭtoro estis fakinstruisto Th. Čejka el Bystřice pod Host., posta ties lernejestro, nestoro kaj fondinto de organizita Esperanto-movado en la ĉeĥaj landoj.

En la jaro 1905 decidiĝis la klubo dividi la laboron laŭ la nacioj kaj tiel estis fondita Klubo de Ĉeĥaj Esperantistoj en Brno, kiu komencis tuj bonege prosperi. Sed en la jaroj 1909-1910 la agado de la klubo iom malvigligiĝis pro la krizo konata sub nomo Ido kaj el tiu tempo tute ne ekzistas informoj pri la klubo. En la jaro 1911 solenis la klubo la unuan dekjaron per solenoj, kiujn partoprenis samideanoj el multaj lokoj de la tiama regno kaj salutleteroj kaj telegramoj venis el la tuta Eŭropo. Ankaŭ D-ro L.L. Zamenhof sendis salutleteron, kiu estis akceptita kun granda entuziasmo. La kunvenojn prezidis D-ro St. Schulhof el Pardubice, referis D-ro St. Kamarýt kaj solena oratoro estis fama komeniologo kaj kunlaborinto de Th. Čejka super lernolibroj de Esperanto, Josef Krumphole.

Venis la unua mondmilito kaj post la teruraj travivaĵoj kaj suferoj la homoj sopiris daŭran pacon kaj subtenis ĉion, kio al ĝi kontribuis. Tial ankaŭ Esperanto mirige vastiĝis. Kaj jam en la jaro 1919 reviviĝas la Klubo de Ĉeĥaj Esperantistoj kaj ŝanĝas sian nomon je Esperantista Klubo en Brno, Ĉeĥoslovakio. Krom prof. inĝ. Vincenc Kroužil aperas pluaj eminentaj kunlaborantoj: fakinstruisto Jan Šembera, fakinstruisto Josef Jeřábek, D-ro Josef Barvíř, prof. Rudolf Fridrich kaj aliaj. Estis aranĝataj pluraj prelegoj, kursoj publikaj en lernejoj kaj en diversaj medioj kaj societoj: por fervojistoj, policistoj, blinduloj. Reviviĝis ankaŭ la literatura agado. Aperas traduko de prof. V. Kroužil *Ĉeĥa literaturo laŭ la birdperspektivo* de Arne Novák, kaj de la sama tradukisto el la angla *Esperanto, internacia lingvo de inĝenieroj*, folkloraj verkoj *Ligado de Tukoj* kaj *Pilgrimo al sakkta Antonio* fare de D-ro J. Barvíř kaj ankoraŭ de la sama *Moravia Karsto*. Rudolf kaj Hana Fridrichovi eldonas tradukon la franca *Ligo de Nacioj pri Esperanto*.

En kadro de la 13-a Universala Kongreso de Esperanto en la j. 1921 organizis la klubo ekskurson de 800 membra karavano al abismo Macoĥa. Pozitiva kontribuo al la ĉs. movado estis tre sukcesa la 1-a ĉs. esperantista kongreso en Brno en la j. 1922 kun partopreno de ĉ. 300 homoj kaj pluraj el eksterlando. Plua kongreso, kiun aranĝis la klubo, estis la VI-a kongreso de ĉs. esperantistoj en Brno en la jaro 1935, kiun partoprenis pli ol 200 personoj, al kiu venis salutleteroj el diversaj ministerioj kaj pluraj organiziĝoj. Kvankam la kongreso estis kunvokita fine de junio, kaj la preparoj povis disvolviĝi nur en septembro, la kongreso estis tre bone preparita, la amika kaj artisma vesperoj havis altan nivelon pro la rolado de eminentaj aktoroj de la Landa Teatro en Brno.

En la jaro 1928 okazis en Brno Ekspozicio de Nuntempa Kulturo. La klubo sukcesis atingi eldonon de prospektoj en Esperanto, kiuj en nombro de 5000 ekz. estis fare de kelkaj klubanoj dissenditaj en la tutan mondon. La Ekspozicion vizitis multegaj eksterlandanoj, inter ili multnombraj esperantistoj. Okaze de la Ekspozicio estis kunvokita kunveno de moraviaj kaj sileziaj esperantistoj.

En la j. 1927 okazis perradia kurso de Esperanto gvidita de direktoro J. Bednář kun sukceso

neordinara. De la sama aperis reklame bona lernolibro Esperanto en dek lecionoj kaj gaja rakontaro Barono Mensogbabilulo.

La klubo iniciatis perradiajn prelegojn en Esperanto. Tiama Radio-journal akceptis la proponon, la prelegoj renkontiĝis kun granda eĥo en eksterlando kaj tial akiris Esperanto firman pozicion en la radio de Brno. El plua iniciato de direktoro Inĝ. Ant. Slavík nombro de prelegoj en radio kreskis, en la programoj rolis eminentaj artistoj de la Landa Teatro en Brno (K. Höger, Švabíková, Bezdíček, Leraus, Lázničková k.a.). La prelegoj informis la mondon pri nia ŝtato kaj popolo, artoj kaj sciencoj. Estis disaŭditaj tutaj dramverkoj (RUR, La Blanka Malsano, Grandhotelo Nevada), tutaj operoj (La Vendita Fianĉino), opereto (La Pola sango, Sur Rozoj Sternite), kabaretoj k.a. Ne mirinde, ke plenrajte la brna radio-stacio, nomata Verda Stacio havis simpatiojn de la tutmonda esperantistaro. La plej granda danko apartenas al la neforgesebla direktoro inĝ. Antonín Slavík, kiu daŭre enskribiĝis en ĉies korojn kiel arda patrioto kaj esperantisto. Li estis ekzekutita de nazioj en la j. 1942 en Berlino. Plue meritiĝis reĝisoro Dalibor Chalupa, prof. Th. Kilian, J. Šamla, M. Strejčková k.a.

En la j. 1935 invitis la klubo Estonon H. Seppik al Brno por gvido de kursoj laŭ la rekta, t.n. Ĉe-metodo. La kursojn antaŭis longa kaj intensa kampanjo gazeta, afiŝado, reklamaado, anoncoj en kinoj, invitoj al oficoj kaj korporacioj. Kursojn partoprenis ĉ. 400 homoj.

De jaro al jaro gradigis la klubo sian aktivecon en tri direktoj: per kursoj, informado kaj por la respubliko. La klubo akceptadis eksterlandanojn kaj ĝuste ilin informis pri la ĉs. problemoj, partoprenis la prunton Defendo de la ŝtato, rilatis kun pluraj eksterlandaj kluboj, ĉefe kun la londona esp. klubo, kien ĝi sendis plurajn artikolojn, du el ili aperis kiel ĉefartikoloj en anglaj gazetoj kaj kelkaj leteroj (fakte ampleksaj artikoloj) estis legitaj en la londona urbestro.

La kritikaj kaj tragediaj septembraj tagoj kaj poste la kapitulaco moderigis iom aktivecon de la klubo, kiu tamen ne ĉesis, sed novajn kursojn kaj pluan agadon trafis la okupacio. Sekvis domtraserĉoj, enketado kaj en la j. 1940 ordono al likvido de la klubo. La likvida ĝenerala kunveno okazis, sed la kunvenoj daŭris ĝis la jaro 1941.

Ses jarojn daŭris la milito pereiginta dekmilionojn da homoj kaj senmezurajn valorojn. Tamen en granda plejparto ni ĝisvivis la grandegan feliĉon, tempon plej belan kaj gloran: la pacon kaj memstarecon. Neniam ni forgesos la Ruĝan Armeon kaj niaan gloran ĉs. armeon, kiuj batalis por liberigi nian patruon. Post la milito la klubo rekonsideris siajn eblojn labori por la internacia lingvo kaj pere de ĝi por interesoj de nia nacio. Al ĉiuj ĉs. kluboj estis sendita salutletero kaj estis komencita intensa laboro: kursoj, centoj da pagitaj anoncoj en ĵurnaloj, tutjara reklamo en 11 kinoj, informado per flugfolioj, almetitaj en nombro de 10.000 al ĵurnalo Ĉin, tri libroekspozicioj en librovendejoj, estis aranĝitaj prelegoj de eminentaj eksterlandaj esperantistoj (Alamo, Bayer, sed antaŭ la milito pluaj de J. Scherer, Kola Ajay, H. Seppik, Giralt, k.a.), koncertoj de bulgara tenoristo Nuni Nanev, de fama franca kantistino el Metropolitana novjorka opero Santreuil estis akceptitaj pluraj karavanoj al eksterlando (de danoj, nederlandanoj, svisoj, italaj, kelkaj karavanoj kalkulis po kelkcent partoprenantoj, sed ĉefe estis akirita solida financa bazo kaj klubaj programoj, spino de la tuta agado.

La klubo meritiĝis pri la ekspozicio Cent jaroj de la ĉeĥa vivo en Kroměříž, la klubo partoprenis en la ekspozicio Verko de P. Bezruč, la tutŝtatan filatelan ekspozicion, daŭre kunlaboris kun la Internacia Foiro de Brno tradukante kelkdek paĝajn bultenojn kaj dissendante ilin en la tutan mondon, tradukis publikaĵon de la Ĉs. Akademio de Sciencoj, arkeologia Instituto, Granda Moravio kaj dissendis 3000 ekz. en la tutan mondon; la publikaĵo renkontiĝis kun granda eĥo, ankaŭ du ambasadorejoj petis la publikaĵon.

Granda kluba entrepreno estis la 8-a kongreso de ĉs. esperantistoj en Brno en la j. 1950, kiun partoprenis pli ol 1000 homoj el la tuta respubliko. La kongreso laŭ la aranĝoj estis vere solena, ĉefe glora estis la koncertvespero sub artisma gvido de prof. V. Scheiber. Plua kongreso, kiu estis komisiita al la klubo, estis la Konstitua Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Brno, en la j. 1969. Kvankam por la preparoj restis eĉ ne du plenaj monatoj, ĝi brile sukcesis, estis modele organizita, ne estis mankoj, partoprenis ĉ. 400 samideanoj. Grandioza estis la artisma vespero sub gvido de prof. V. Scheiber.

La klubo solene festis 40 jarojn de Esperanto, 50 jarojn de la klubo, 60 jarojn (ĝia 60-a jubileo estis anoncita al la publiko de pluraj urboj per impresaj afiŝoj), kaj nun ankaŭ preparas solenaĵojn por la 70-a datreveno.

La klubon vizitis K. Kalocsay, J. Baghy (2 foje), Tárkonyi kaj ties prelegojn ni aŭdis.

Estis aranĝitaj pluraj ekspozicioj: la unua en la j. 1923 kaj 1950 en la kadro de la Ekspoziciaj Foiroj de Brno, Ekspozicion de Esperanto okaze de la Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Brno (1936), la plej grandan ekspozicion en la j. 1937 Sepdek jaroj de Esperanto, en 1965 Ekspozicion de Esperanta Libro.

La fama paĝo de la klubo estas la solenaj koncertvesperoj sub artisma gvido de komponisto kaj prof. V. Scheiber. Ili okazas ekde la j. 1946 ĝis nun, regule dufoje jare omaĝe al L.L. Zamenhof, Smetana, 50 jaroj de nia respubliko, okaze de la kongresoj kaj solenaj kunvenoj. La vesperoj estas grandaj solenoj, partoprenas en ili eminentaj artistoj de la brna muzika vivo. Al la koncertoj estas dediĉata maksimuma zorgo flanke de prof. Scheiber, ekzistas jam kelkcent perfektaj kaj artismaj tradukoj de la plej famaj ĉeĥaj kaj tutmondaj operoj, kantoj ktp. Ekzistas trezoro, kiu, se estos eldoneblo, mirigos la kulturan kaj esperantistan mondon. La tradukojn faris: R. Hromada, D-ro J. Fousek, plej multe J. Kořínek, prof. M. Lukáš kaj D-ro T. Pumpr.

La klubo kolektis unikan materialon dokumentan, turismajn prospektojn, prospektojn de monfirmoj ktp., abonadon de gazetoj en pluraj ekz. ĝi opiniis ĉiam ekstrema grava, same subtenon al Esperanta literaturo.

Dum la tuta ekzistado de la klubo ĝia celo estis: aranĝi kursojn, prelegojn, ekspoziciojn, subteni Esperantajn preson kaj literaturon, akceptadi eksterlandajn esperantistojn, faciligi al ili restadon en nia lando kaj urbo, ebligi al ili viziton de turisme kaj historie interesaj lokoj kaj kontribui al reciproka ekkonado, interkompreniĝo kaj amikeco. Al grava aktiveco de la klubo apartenas klerigaj, populare sciencaj prelegoj el ĉiuj sferoj de la homa scio, prelegoj al gravaj kulturaj datrevenoj naciaj kaj internaciaj, societaj programoj, kiel teatraj prezentadoj, kunlaboro kun Esperanto-organizaĵoj ktp.

Laboro de la klubo estas laboro por interkompreniĝo kaj amikeco, krom penado al perfekta scio de la lingvo, daŭrigo en kulturaj kaj klerigaj aktivecoj. Dum la 70 jaroj la klubo sukcese kaj altgrade plenumis sian mision. Malgraŭ sia peniga kaj respondeca laboro ĉiam niaj membroj trovis ion de tempo por kunlabori kaj partopreni ĉiujn gravajn kulturajn kaj societajn eventojn, utilaj por la movado kaj la publika vivo entute.

Konsiderinda estas la literatura agado de niaj membroj: prese aperis Panjo de J. Seifert en traduko de J. Kořínek, Sileziaj Kantoj de P. Bezruč de la sama en kunlaboro kun R. Hromada kaj D-ro T. Pumpr, Libro do Apokrifoj de K. Čapek en traduko de J. Vondroušek, kaj publikaĵo Granda Moravio de la nomita. Sed en manuskriptoj ekzistas pluraj verkoj atendantaj eldoneblon: Manon Lascut, opero Jakobeno, Bestetoj de K.V. Rais, Rakontoj el unu poŝo, Rakontoj al la dua poŝo, Saturnin, Ondro kaj drako ktp. Ankaŭ ĉe tiu okazo ni nomu prof. Th. Kilian, multjaran honoran membron de la klubo, aŭtoron de la plej popularaj Esperanto-lernolibroj, tradukinto de La Blanka Malsano de K. Čapek k.a. Traduko de Martin Fierro, ĉefverko de la argentina literaturo de Jose Hernandez estas laboro de nia iama membro Ernesto Sonnenfeld. Kaj Koboldo Ondra de Mahen fare de R. Fridrich.

La klubo laboras sub aŭspicioj de la Parko de Kulturo kaj Ripozo en Brno kun plena apogo kaj kompreno, tiom gravi por la laboro.

Al la klubo ni deziras, ke ĝi restus fidela al sia elprovita tradicio, kaj deziras al ĝi plenan prosperon kaj feliĉajn tagojn.

La artikolo de Josef Vondroušek estis verkita por Starto, ĝi aperis en la numero 4/1971 (18) sur paĝo 3, sed forte reduktita. Informoj pri la soleno mem estis publikigita en la kluba bulteno (3/1971), mi aldonas ĝin kiel kompletigon (M. Malovec, 2018-09-23):

Poznámka pro brněnské esperantisty. Jen v Brně dostalo pozvánku na oslavu přes 400 esperantistů. Šlo přece o jejich klub a o významné výročí jednoho z prvních klubů ve střední Evropě. Byly připraveny dva umělecké

pořady vrcholné úrovně za účinkování předních umlců brněnského i mimo-brněnského uměleckého světa, pořady, kterými se může pochlubit málokterý z tisíců esperantských klubů na světě. A jaká byla účast? Asi 120 účastníků, a z nich skoro polovina z různých míst republiky, polovina, která vážila více méně dlouhou cestu a těšila se na setkání a na přátelský pohovor. Co myslíte, brněnští esperantisté, máme snad od těchto kulturních pořadů upustit? Nežádáme přece vstupné /příspěvek pro přihlášené nepokryl ani režii/, ale především Vaši účast a podporu.

70 jaroj de EK Brno. - En la tagoj de 11.-13.jun. ambaŭ Esp.-kluboj en Brno /la nia kaj tiu de Unua Maŝinfabriko/ komune aranĝis la solenigon de la jubileo. La programo estis vere riĉa. Vendredon, la 11-an, okazis en la poezia vinejo Múza vespero de Esp.-poezio "Eterna bukedo". Specimenojn de tradukita /el la ĉeĥa, slovaka, angla, germana, rusa, ĉina k.a. kaj originala poezio prezentis profesiaj aktorinoj Alena Růžičková-Pavlinová kaj Aranka Lapešová, kun niaj membrinoj Marta Lorková kaj Olga Valentová. Kantojn prezentis Mir. Smyčka /Ústí n.L./, pianekompanis D. Zaorálková. La vespero vekis merititan intereson ankaŭ en neesperantista publiko. Sabata antaŭtagmezo en hotelo Slovan estis dediĉita unue al solena kunsido kun festkaj salutparoloj. I.a. parolis ing. Fr. Sviták /por ĈEA/, Ed. Tvarožek /por AE SSR/ k. reprezentantoj de aro da ĉeĥoslovakaj kluboj. Inter la salutleteroj la sola eksterlanda venis el Sovetunio, de Interklubo en Doneck, USSR. Reprezentantoj de PKO kaj de EK aranĝis laŭmeritan honorigon al la prezidanto Jos. Vondroušek, al malnova membrino Růž. Kaplerová kaj al Alena Růžičková-Pavlinová pro ŝia kontribuo kaj iniciatemo en la kultura vivo urba kaj kluba. La historio de klubo, kiu naskiis en junio 1901 kiel "Unua Societo de Aŭstria Esperantistoj", prezentis en sia ĉefparolado Jos. Vondroušek. Sekvis koncerta matineo sub la gvido kaj pianakompano de prof. Vilibald Scheiber. Kantojn kaj ariojn plejparte el ĉeĥaj aŭtoroj /Smetana, Dvořák, Janáček, Novák k. Křička/ prezentis profesiuloj H. Halířová-Supová, V. Dronská, R. Chudoba k. M. Smyčka /Ústí n.L./ en tradukoj de T. Pumpr, J. Kořínek k. M. Lukáš. Ili rikoltis tondran aplaudon, ĉar ilia altnivela prezento estigis ĉe la spektantoj solenan etoson. Sabata posttagmezo kaj dimanĉa antaŭtagmezo apartenis al Konferenco pri la historio de la Esperanto-movado sur la teritorio de ĈSSR, unua tiaspeca aranĝo ĉe similaj okazoj. La prelegojn preparis J. Cink, Vuk Echtner, Jar. Mařík, ing. Fr. Sviták, E.V. Tvarožek k. d-ro Vl. Novobilský, CSc. ĈEA preparas publikigon de konferenca almanako./ Sabate ankaŭ okazis amuza vespero kun dancado. La jubileon salutis per poemoj Jiří Kořínek kaj Milda Jakubcová. Ĉiuj partoj de la solena kaj labora programo estis bone preparitaj kaj altnivelaj. Dezirinda estis nur pli granda partopreno flanke de lokaj samideanoj.

Zprávu o 70. výročí Esperantského klubu v Brně přinesly světelné noviny a rozhlas, který také vysílal asi 20minutovou přednášku o esp. hnutí a brněnském klubu, připravenou J. Vondrouškem. Svobodné slovo otisklo rozsáhlý interview s předsedou klubu. Další denní tisk přinesl zprávy o výročí a přehled o činnosti klubu.